Nova imperiestro kaj lia“epoko”
la 3an de majo 2019

La Imperiestro Heisei detroniĝis kaj nove lia filo surtroniĝis, akompanate de la nova epoka nomo Reiŭa. Hodiaŭ mi skribos pri tiu temo.

Ŝanĝiĝo de epoknomo laŭ la tronado de la imperiestro

En la lernolibro de Japana Historio oni dividas la japanan historion en pli ol dek epokojn, ekzemple Joomon-epoko en ŝtonepoko, kiam oni faris argilaĵojn, kiuj havas desegnaĵojn aŭ spurojn de ŝnuroj (*ĵoomon*), Heian-epoko, Kamakura-epoko kaj Edo epoko laŭ la nomoj de la ĉefurboj, sed post la japana moderniĝo en 1868 subite la nomoj de la imperiestroj (*tennoo*-oj) fariĝis la epokaj nomoj, ekzemple Meiĵi-epoko laŭ la imperiestro Meiĵi, Taiŝoo-epoko laŭ la imperiestro Taiŝoo, Ŝooŭa-epoko laŭ la imperiestro Sooŭa kaj ĵus finiĝinta Heisei-epoko laŭ la imperiestro Heisei. Kaj ekde la 1a de majo 2019 komenciĝis la nova epoko Reiŭa. Jen estas la epoknomoj (*gengoo*-oj) post la japana moderniĝo:

Meiĵi	1868.10.23 ~ 1912.7.29 (45 jaroj)
Taiŝoo	1912. 7.30 ~ 1926.12.24 (15 jaroj)
Ŝooŭa	1926.12.25 ~ 1989.1.7 (64 jaroj)
Heisei	1989. 1. 8 ~ 2019.4.30 (31 jaroj)
Reiŭa	2019.5.1 ~

Kiam mi lernis la japanan historion en lernejo, mi tute ne havis dubon pri tiuj epoknomoj en la moderna historio, sed post kiam mi havis pli da scio, mi ekhavis dubon. Precipe por mi estas stranga la Ŝooŭa-epoko. Tiu epoko komenciĝis en 1926, kiam la imperiestro Taiŝoo mortis kaj la nova imperiestro surtroniĝis, kaj finiĝis en 1989, kiam tiu imperiesro Ŝooŭa mortis. Kaj la historiistoj nomas la epokon la epoko Ŝooŭa. Ĝis tiu epoko, ĉiuj epokoj havis komunan socian tendencon dum sia epoko, ekzemple dum la Edo-epoko la militistaro Tokugaŭa regis la tutan Japanio en la ĉefurbo Edo, nuna Tokio, kaj homoj vivis en komunaj socio kaj kulturo. La Edo-epoko daŭris 350 jarojn.

Nu, kio estas la Ŝooŭa-epoko? Ĝi havas du malsamajn trajtojn, nome ĝis la 15a de aŭgusto 1945, la fino de la dua mondmilito, Japanio estis regata de militarisma reĝimo. Homoj ne havis homajn rajtojn. Ili devis obei la imperiestron kaj eĉ perdis vivon, mobilizite al la batalkampoj. Tiu militarisma, *tennoo*-isma reĝimo komenciĝis tuj post la japana moderniĝo kaj daŭris ĝis la fino de la milito. Kaj poste komenciĝis demokratia Japanio kun nova konstitucio kun homaj rajtoj kaj malpermeso de militrajto de la ŝtato. Kaj tiu demokratia

sistemo daŭras ĝis nun. Tial mi opinias, ke la japana moderna historio devas esti dividita en du epokojn, nome “Militarisma Epoko” (1868-1945) kaj “Demokratia Epoko” (1945- ĝis nun), ne laŭ la surtroniĝo de imperiestroj. Tamen mi neniam aŭdas tian argumenton en la historiistaro kaj ankoraŭ restas nelogikaj epok-nomiĝoj.

Komenciĝo de *gengoo*

Gengoo komenciĝis en Ĉinio ĉirkaŭ en la jaro 115 antaŭ Kristo kaj daŭris ĝis 1911, kiam finiĝis Qing-dinastio. Antaŭe Japanio, Koreio kaj Vjetnamio estis sub la influo de Ĉinio, do ĉiuj landoj uzis siajn *gengoo*-ojn, sed nun neniu krom Japanio uzas ĝin, ĉar *gengoo* baziĝas sur la reĝ-reĝimo, kaj en tiuj landoj reĝoj estis jam forpelitaj. Nur en Japanio restas la reĝ-reĝimo, do Japanio ankoraŭ havas *gengoo*-on.

En Japanio oni komencis uzi *gengoo*-on en la jaro 645, kaj *gengoo*-sistemo daŭras ĝis nun. Antaŭ la japana moderniĝo ofte okazis ŝanĝiĝoj de *gengoo* okaze de iu feliĉego aŭ malfeliĉego dum la tronado de unu imperiestro, sed poste la nova registaro leĝigis en 1868, ke unu imperiestro tenu unu *gengoo*-on kaj ŝanĝiĝo de *gengoo*-o okazu, kiam mortas la surtrona imperiestro. La registaro celis fondi fortan ŝtaton, igante la imperiestron kiel kernon por obeigi la popolanojn, sekve Japanio fariĝis unufamilia lando kun imperiestro ĉe la pinto same kiel patro en familio.

Dum la militaj jaroj la imperiestro estis adorata kiel Dio aŭ pli ĝuste la popolanoj estis edifitaj por ke ili adoru

lin kiel tia, kaj la registaro ordonis, ke la popolanoj mortu por li kiel sublima ago de la regatoj. La vortoj “Ordono de la imperiestro” havis tiel absolutan forton, ke neniu povis rezisti la ordonon de siaj supruloj kun tiuj vortoj. En la armeo ordono de supruloj estis ordono de la imperiestro.

Ĉi-foja ŝanĝiĝo de la *gengoo* al Reiŭa (foto) ne estis kutima, ĉar ĝi ne okazis je la morto de la imperiestro, sed okazis laŭ la volo de la Heisei-*tennoo*, kiu volis detroniĝi pro tio, ke li baldaŭ ne povos bone plenumi sian taskon pro maljuniĝo. Kiam mi rememoras la finon de la Ŝooŭa-epoko, la imperiestro estis longe mortanta aŭ vivigita per medicino, do la tutan Japanion kovris hezitado agi gaje, tial multaj koncertoj kaj similaj gajaj eventoj estis nuligitaj aŭ prokrastitaj, sed tiun ĉi fojon Ŝooŭa-*tennoo* fartis bone, do nenie estis malĝojo kaj male festa etoso.

La imperiestreco estas la lasta sklaveco

Fine de la dua mondmilito kiel trakti la tiaman imperiestron kaj la *tennoo*-reĝimon estis grava problemo por Usono kaj aliancaj landoj. Iuj postulis, ke Ŝooŭa-*tennoo* estu mortpunita, ĉar li estas la plej grava respondeculo kaj militkrimulo de la invada milito, sed aliaj postulis, ke li pluvivu, ĉar li estas utila por regi la

japanojn, kaj fine Usono decidis utiligi lin, senkulpigante lin, sed anstataŭe ĝi donis al Japanio la nunan konstitucion, kiu decidis, ke *Tenno*, imperiestro, perdu sian politikan potencon kaj agu kiel simbolo kiel sube:

Artikolo 1
La Imperiestro estas la simbolo de la Regno Japanio kaj de la unueco de la japana popolo. Ĝi ŝuldas sian pozicion al la volo de la japana popolo, al kiu apartenas la suverena povo.

La Heisei-tennoo ĵus detroniĝinta spertis la militon kaj eble sentas sin kulpa kiel filo de Ŝooŭa-*tennoo*, kaj energie vizitadis la tragediajn lokojn de la milito, ekzemple Hiroŝima, Nagasaki, Okinaŭa, kaj eĉ Saipan en la suda Pacifika Oceano ktp. Al mi ŝajnis, ke li plenumis sian taskon por paco anstataŭ la registaro, kiu ĉiam neglektis/as sian invadan militon kaj eĉ akcelas plifortigon de la defendkorpuso kiel la japana armeo. Li sincere celis esti “la simbolo de la unueco de la japana popolo”, tial li estas estimata kaj amata de multaj japanoj. Tamen ĉu ni rajtas laborigi la imperiestron en tiu pozicio?

Iuj diras, ke Tennoo-reĝimo estas la lasta sklaveco en Japanio. Tennoo kaj liaj familianoj ne havas familian nomon, ne estas registritaj kiel japanaj popolanoj, ne havas rajton voĉdoni, ne havas rajton libere elekti laboron, nek loĝejon ktp, kion la japana konstitucio garantias al la japanaj popolanoj.

Nur viraj familianoj povas esti heredantoj de la *tennoo*. Strange malmultaj filoj naskiĝis en la familio, do nun estas nur tri homoj, kiuj rajtas fariĝi *tennoo*-oj, nome Hitaĉinomija 83-jara, Akiŝinomija 53-jara kaj lia filo Haruhito 12-jara. La nuna *tennoo* havas filinon Aiko (foto), sed laŭ la leĝo ŝi ne havas rajton fariĝi *tennoo*. Povos okazi, ke estas neniu heredanto. Tial la edzino de la imperiestro devas naski viran bebon. La nuna imperiestrino Masako ne sukcesis en tio, kaj tio estis unu kialo de ŝia melankoliiĝo. Malpermeso de virina *tennoo* estas granda diskriminacio al virinoj, sed dekstruloj, inkludante la nunan ĉefministron Abe, kontraŭas virinan surtroniĝon.

Tennoo kaj *tennoo*-reĝimo estas malstabila. Unuflanke estas homoj, kiuj kontraŭas tiun reĝimon, kaj aliflanke estas homoj, kiuj utiligas ĝin por revivigi militarisman aŭ *tennoo*-reĝiman registaron. Nun tiu ĉi flanko estas pli forta. La reganta partio Liberala Demokratia Partio, kies ĉefo estas la ĉefministro Abe, volas igi *tennoo*-on la regnestro, donante al li politikan forton. Por tiu celo, okaze de ĉi-foja surtroniĝo de la nova *tennoo*, la registaro

fanfarone substrekis, ke la nova epoko venis kun la nova *tennoo*, kaj sekvante ĝin, ĵurnaloj skribis kaj televido kriis "Komenciĝo de la nova epoko Reiŭa", kvankam la *tennoo* havas neniun potencon ŝanĝi la socion. Se li povus bonigi Japanion, mi bonvenigus lin, sed en efektiveco lia surtroniĝo tute ne malfermas la novan epokon. En nia socio multaj daŭre suferas pro malstabila laboro, altiĝo de la imposto kaj mizera maljuniĝo. La registaro provas doni rozkoloran iluzion al la popolanoj.

Gengoo estas maloportuna

La registaro duone trudas al ni uzon de *gengoo*. Sur dokumentoj ni devas skribi datojn kaj niajn naskiĝdatojn. En la oficialaj dokumentoj ni devas preskaŭ nepre skribi la jaron laŭ *gengoo*, sed internacie *gengoo* tute ne validas, do en nia pasporto estas skribita nia naskiĝdato laŭ kristana erao.

Mia patro naskiĝis en la 2a jaro de Taiŝoo-epoko. Tiun tempon oni ĉefe uzis *gengoo,* do li ĉiam diris sian naskiĝjaron laŭ *gengoo*. En kiu jaro li naskiĝis laŭ la kristana erao? Estas malfacile respondi al tiu demando. Ni devas trovi la respondon en la tabelo de du jarkalkuloj kaj scias, ke li naskiĝis en 1913.

Por respondi pli facile mi memoras jenajn kalkuladojn:

1. la jaro 1900 estas la 33a jaro de Meiĵi.
2. la jaro de Taiŝoo + 11 estas la jaro laŭ kristana erao, ekzemple la 2a jaro de Taiŝoo estas 1913.
3. la jaro de Ŝooŭa + 25 estas la jaro laŭ kristana erao,

ekzemple la 16a jaro de Ŝooŭa (mia naskiĝjaro) + 25 estas 1941.

Tamen mi ne havas tian kalkuladon pri la jaro de Heisei, do mi devas vidi tabelon pri jarkalkulado.

Ĝis tiam la registaro trudas al ni tian maloportunon? Dekstruloj diras, ke *gengoo* estas japana tradicio, sed mi ne volas tiun maldemokratian kaj maloportunan tradicion. Mi volas vivi internacie kaj demokratie.